

# Laŭokaza Novaĵletero

organo de la

**Internacia  
Komerca kaj  
Ekonomia  
Fakgrupo.**

Redakcia adreso :  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB,  
Britio.

VKEF  
★  
1984

Numero 23;

oktobro, 1988.

Laŭokaza Novaĵletero,

oktobro, 1988a.

## E n h a v o .

<u>paĝo</u>	<u>titolo(j)</u>	
2	Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.	
3	Interkonatiĝo Administrado	
4	Novaĵeroj, de kaj pri niaj membroj	
5	Faka ekskurso dum la U.K.	Roland Rotsaert.
6	Recenzo: FOKUSO 88-1 kaj 88-2 Pri reklamanoncoj en FOKUSO	Lorens' Mi. Franz Braun.
7	Nova eŭropa projekto Negocado en Ĉinio	Roland Rotsaert. Kees Ruig.
8	Al diskuto malfermita ... du kontribuoj Roland Rotsaert kaj Franz Braun.	
9	Vizito al ekspozicio	Roland Rotsaert.
10	Oficiala decido de La Akademio de Esperanto.	
11	Cu oni rajtas redakti ... ?	Lorens' Mi.
12	Reklamanoncetoj Teknike pri la LN-o.	

**Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.**  
Kunlaboranta faka asocio de Universala Esperanto-Asocio.

## La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario  
S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto  
D-ro István Gether  
S-ro François-Xavier Gilbert  
S-ro Lawrence Mee  
D-ro Marco Picasso  
S-ro Seikó Yamasaki

Revizoro por la financa raportoj:  
D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16, Okc. Germanio.

Financa sidejo:  
Visspaanstraat 97,  
8000 Brugge, Belgio.

Redaktoro, Laŭokaza Novaĵletero:  
S-ro Lawrence Mee,  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,  
Britio.

Prizorganto, presado-ekspedado:  
S-ro F.-X. Gilbert,  
Vert Coteau,  
Longeville-en-Barrois,  
Francio.

-oOo-

**Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.**

## Pagoj — Perantoj — Kotizoj

Ciuj landoj: Baza kotizo: 400 belgaj frankoj aŭ 20 nederlandaj guldenoj.  
Dumviva membreco: unu-foja pago egala al 20-oble bazan kotizon;

Postĉekkonto belga, (Bruselo):  
n-ro 000-1592629-83  
je la nomo de IKEF, p.a. R. Rotsaert,  
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio.

Konto de Universala Esperanto-Asocio,  
Rotterdam, Nederlando,  
je la nomo de Internacia Komerca kaj  
Ekonomia Fakgrupo, Belgio.

## Perantoj:

## Britio

- provizore vakas -

## Francio

S-ro F.-X. Gilbert,  
Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,  
55000 Bar-le-Duc. (CCP1275-89 L Nancy)

Okc. Germanio Kotizo: 20 markoj.  
S-ro F.J. Braun,  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16.  
(Volksbank Bühl 713120 - BLZ 66291400)

## Hungario

S-ro J. Horvath,  
Varsányi Irén u. 8,  
1027 Budapest.

## Italio

D-ro M. Picasso,  
via De Gasperi 7,  
20057 Veduggio al Lambro.

## Jugoslavio

S-ro S. Taleski,  
ul. 'Oslo' br. 12,  
91000 Skopje.

## Novzelando Kotizo: 20 dolaroj.

S-ro J.C. Rapley,  
P.O. Box 70-038,  
Ranui, Auckland 8.

## Togolando

S-ro Koffi Gbeglo,  
B.P. 13169,  
Nyékonakpoé, Lomé.

## INTERKONATIĜO

Pro la breĉo kaŭzita de la transpreno de respondecoj por la aperigo de nomoj de novaj membroj, ni havas ĉi-foje relative longan liston.

Kun aparta piezuro, do, kaj kun pardonpeto por la prokrasto, ni bonvenigas al nia rondo la jenajn novajn membrojn.

Membro-listo je 1986-10-01

- 73 Lee, Prof. Chong-Yeong, universitata profesoro,  
Fak. de Komercio kaj Ekonomia, Kyungpook Nacia Universitato,  
Teagu, Suda Koreio;
- 74 Shen, Prof. Chenru, universitata profesoro,  
Academia Sinica, 52 Sanlihe, Beijing, Ĉinio;
- 75 Ohba, Prof. Atsuo, universitata profesoro,  
164 6-35-20 Honcho Nakano-ku, Tokyo, Japanio;
- 76 Texier, S-ro Jean-Louis, komercdirektoro,  
27 Chemin des Carreaux, Cerny, 91590 La Ferté Alais,  
Francio;
- 77 Könyves, S-ro Zoltán, entreprenisto,  
Str. Cserény 1, 6114 Bugac, Hungario;
- 78 Van den Kieboom, S-ro Walter, komercisto pri domtekstaĵoj,  
Witdoekt N.V., Witte Nonnenstraat 9a, 8400 Oostende,  
Belgio.

Kiel kutime, ni petas sciigon pri iuj ajn eraroj de detaloj en publikigitaj informoj pri niaj Membroj.

De du membroj ni ricevis petojn atentigi pri nova adreso:  
S-ro J.C. Rapley, (IKEF6), P.O.Box 70-038, Ranui, Auckland 8,  
Nov-Zelando.  
S-ro F. Schneider, (IKEF13): Löherweg 7, 5960 Olpe-Biggese, Okc. Germanio.

## ADMINISTRADO

La Financa Konsilanto agnoskas kun danko donacojn de niaj membroj, ĝis la fino de septembro; ĉiuj sumoj estas en belgaj frankoj.

S-ro F. Schneider, (IKEF13) 243; S-ro H.H. Bühl, (IKEF26) 209;  
S-ro F.J. Braun, (IKEF4) 836; S-ro L. Mee, (IKEF2) 599;  
Ek. Grupo de HEA, (IKEF24) 1 537.

La Financa Konsilanto memorigas, ke post nelonge oni devas pripensi denove pagon de kotizo, kaj petas fruajn pagojn se iel ablas. Se samtempe kun pago de la kotizo, Membro faras ankaŭ mondonacon, des pli bone, kaj aparte nia Subtena Fondaĵo, (por pagi kotizojn de Membroj en landoj kun pagomalfacilaĵoj), vere meritas vian donacemon. Anticipajn dankojn!

La Prezidanto anoncas kun ĝojo la ricevon de formala letero, kun subskribo de la Ĝenerala Sekretario de Universala Esperanto-Asocio, sciigante al ni, ke la Komitato de UEA, dum kunsido en Roterdamo dum la Universala Kongreso, akceptis la proponon pri kunlabora kontrakto kun Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo. S-rino Szabó-Felső, esprimis esperon, ke la komuna agado de niaj organizaĵoj estos sukcesplena. Kun fiero, ni recipokas tiun esperon.

Laŭokaza Novaĵletero

NOVAĴEROJ, de kaj pri niaj membroj.

Pri la:

Dua Internacia Konferenco de la  
Ĉina Akademio de Sciencoj.

En tiu konferenco - kies kunordiganto estas Profesoro Chenru Shen, membro de IKEF - partoprenis 1400 personoj el la tuta mondo. Raporto pri la konferenco aperis, inter aliaj, en la angla-lingva Ĉina gazeto, *China Daily*, de la 19a de aŭgusto.

Dua la konferenco, oni aljuĝis premiojn, "Verda Kosmo", pro elstaraj kontribuoj en scienco. Inter la premiitoj troviĝas alia membro de IKEF, neniu alia ol nia Estrarano, D-ro Marco Picasso.

Alondita de la Akademio estas kunveno, planita por decembro, 1988, pri la temo, teknika transigo, komercado kaj kuniaboro en Ŝenzen.

Flanke de niaj legantoj, ni dankas al la gratulas de niaj membroj pro la (indonezaj) raportitaj.

-----  
Ankaŭ de Ĉinio venas alia informero:

Profesoro Danchen Zhang, profesoro pri la lingvoj, rusa, angla kaj Esperanta en Ĉina altlernejo, restis, post la U.K. en Roterdamo, dum pli ol monato en Eŭropo, kun S-ro Zhang eluzis la tempon viziti plurajn entreprenojn, por ekscii pli pri la "okcidentaj" komercaj sistemoj.

Inter la eks-kursanoj en Ĉinio de S-ro Zhang troviĝas multaj fabrikestroj, kiuj nun serĉas malkovri eblecojn komerci internacie. Regula korespondado en la internacia lingvo estas grava al ili por konvinki la lernejestrojn pri la valoro de Esperanto.

Niaj membroj estas petataj kontribui al tiu korespondado, laŭeble ofte. Uzu la adreson: S-ro ZHANG Danchen, General Foreign Languages Department, Huazhong Normal University, Wuhan, Ĉinio.

-----  
Membro kaj Estrarano de IKEF, kaj Redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero, S-ro Lawrence Mee, lastatempe fariĝis Kasisto por la Skolta Esperanto-Ligo. Por ĉiuj viaj subtenoj en tio, Anticipan Dankon!

De nia membro en Kiarujo, Britio, S-ro John Dickinson, ni ricevis longan priskribon pri la regiono kaj pri la evidente multaj eblecoj ĝi apartajn specojn de libertempo en tiu pitoreska lando de kontetoj kaj pejzaĝoj.

Lastatempe, de la oka de la oka okdek-ok, ĝis la 15a de aŭgusto, kunvenis en la urbeto Abergevenny, (pr.: (tre proksimume) ab'rgaveni), preskaŭ sesdek fervojistoj el ok landoj, por partopreni en renkontiĝo kiu estis kaj jarkunveno kaj distraĵokazaĵo. La ĉefa prizorganto de la aranĝoj estis S-ro Dickinson.

La kunveno estas nun tre vizitinda, kiel skribas nia Membro. Iam estinte la somerdomo de barono, kun iorge flegita parko kaj multaj vidindaĵoj, ĝi nun estas kolegio por kulturaj aranĝoj, kun ampleksaj loĝeblaj. En ĝi regule kunvenas grupoj de adeptoj en diversaj branĉoj de muziko kaj aliaj artoj, en manlaboroj de diversaj specoj, en literaturo kaj en lingvoj, inkluzive de Esperanto. Pluraj formoj de sporto ĝuas tre konvenan lokon en la parko kaj ĉirkaŭaĵoj.

S-ro Dickinson asertas, ke la eblecoj por ĝindaj renkontiĝoj estas, ĉu en tiu kastelo mem, ĉu en la apuda regiono, vere abundaj. Li pretas kaj volas ebligigi al niaj membroj sperti la eblecojn.

Adreso por informpetoj:

S-ro John Dickinson,

Esperanto-Domo,

Llanfoist, Abergevenny,

NP7 9NR, Britio.

-----  
Ĉiam donas ĝojon al via Redaktoro vidi la nomojn de membroj niaj cititaj kiel aŭtoroj de kontribuoj al aliaj periodaĵoj en la E.-Movado. Lastatempe en revuo MONATO ni ekvidis la nomojn de Luiso Gilperez kaj Paŭlo Seesink, kaj en aparta loko tiu de Koffi Gbeglo.

Post akiro de lerteco per aperigo de artikoloj en tiaj ne-tre-gravaj paĝoj, eble iam tiuj aŭtoroj donos al ni la altan plezuron aprezi kontribuojn por ŝperigo en la pli prestiĝaj paĝoj de la Laŭokaza Novaĵletero.

Ci-foje, tamen, via Redaktoro vere embarasiĝis per abundo de materialo, kaj rezervas iun plendon por alia fojo.

Dankon! al ĉiuj kontribuantoj.

Faka ekskurso dum la U.K.  
en Roterdamo.

Raportas: Roland Rotsaert.

Dum la Ĵusokazinta Universala Kongreso, kvindek de kongresanoj vizitis la sidejon de la Komerc-Ĉambro en la kongresurbo, Roterdamo. Akceptis ilin, flanke de tiu instanco, S-ro M.J. Landman.

S-ro Landman prelegis pri la historio kaj la organizo de la Ĉambro, kaj pri la roterdama haveno. La prelego okazis en la nederlanda lingvo; interpretis ĝin por ni IKEF-ano Ing. Ruig.

Poste, la kongresanoj spektis filmon pri la haveno, kaj ankaŭ iris ĝi panoramon de la urbego, ekde la plej supra etaĝo de la konstruaĵo.

Resumo de la prelego de S-ro Landman.

La Ĉambro de Komerc kaj Fabrikoj, laŭ la oficiala nomo de la instanco, estas publika organizaĵo, fondita en 1803 jam. Ĝiaj 60 membroj reprezentas provincajn, lokajn kaj regionajn organizaĵojn de entreprenistoj kaj laboristoj.

La pleja parto de la enspezoj venas el la kontribuoj de la 43 000 registritaj entreprenoj. En Nederlando, aliĝo al apuda komerc-ĉambro estas deviga por entreprenoj; el tiu devigo rezultas, ke la instancoj ĝuadas regulajn enspezojn, kaj estas finance sendependaj. En la roterdama ĉambro deĵoras proks. 170 personoj.

La ĉefa labortereno de la Ĉambro estas konsilanta: laŭpete aŭ senpete, ĝi povas konsili al publikaj organoj pri komercaj aferoj. Dua, ankaŭ grava, taskaro estas plenumado de leĝoj, ekzemple pri kompani-registrado, komercaj nomoj, butikhoroj, atestoj de origino, kaj tiel plu. Tria taskaro estas la transdonado de diversaj informoj al entreprenistoj, en- kaj ankaŭ ekster-landaj.

La Ĉambro estas aŭtonoma kaj tute sendependa; ĝi kunlaboras kun lokaj, naciaj kaj internaciaj organizaĵoj.

La havenurbo Roterdamo.

En la datro de tempo, Roterdamo el-kreskis ĝis impona komercocentro. Ĝi nun estas la plej granda havenurbo en la mondo, kun debito kiu atingas 250 milionoj da tunoj jare. El tio, 60 elcento estas transita el aŭ al alia lando. La eta ŝtato Nederlando entute spertas grandegan

komercon; la valoro de importoj kaj eksportoj kune sumas al 465 miliardoj da guldenoj, laŭrange la oka en monda komerc. Fizikaj varfluoj ne ĉiam havas rilaton al la loka komerc, tamen; roterdama komercaj kompanioj prikomercas sennombrajn produktojn kiuj neniam atingas Nederlandon mem.

La komerca politiko estas laŭeble libera, sed Roterdamo ne estas "senimposta" haveno. Pri internaciaj valuttrafiko kaj investoj oni ne fiksas limojn. Nederlando havas bonan "klimaton" por administraj kompanioj. Establita sistemo de dogan-kontrolado donas ĉiujn eblecojn por libera trafiko de varoj kaj servoj. Pro daŭre ŝanĝanta merkatsituacio, tre forte kreskas la funkcio de Roterdamo kiel staplejo.

Ekzemploj de tipe roterdama aktivecoj estas komerc en grenoj kaj ne-feraj metaloj, la senliga olebazar, la felbazar, kaj komerc en citrusaj kaj aliaj fruktoj, en konsumeblaj oleoj kaj grasoj, kaj en spicoj diversaj. Funkcioj de la haveno inkluzivas kolektiĝo de varoj de disaj fabrikantoj, konservado de la varoj, transportado de la varoj al klientoj alilokaj, kaj distribuado de la varoj el staplejo al aĉetantoj.

La situo de Roterdamo estas tre favora al ĝi. En la radiuso de 500 km ĉirkaŭ la urbego troviĝas aĉetivan loĝantaron de pli ol 160 milionoj da homoj, kune kun la amasiĝo de eŭropa industrio.

Komercado kaj transporto ne eblas sen stabila fono de financa subteno, asekurado, kaj tiel plu. Por Nederlando, la servado de la internaciaj komercaj bankoj kaj asekurkompanioj, kune kun la makleristoj, advokatoj, konsilistoj financaj, kaj tiel plu, grave kontribuas al la tiel nomata, "nevidebla eksporto".

gloso: citruso - genro de (frukt)arboj kaj arbedoj el varmaj landoj, kun pluraj konataj specoj, inkl. de citrono, grapfrukto, oranĝo, kaj multaj aliaj. (Plena Ilustrita Vortaro)

noto de la aŭtoro: la tuta teksto de la esejo pri Roterdamo, en Esperanto sur 12 folioj, estas havebla kontraŭ pago de du int. respondkuponoj al la adreso: Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio, aŭ de egalvaloro al la posttekkonto de IKEF, ĉe la konata adreso.

## R E C E N Z O

FOKUSO, 88-1 kaj 88-2; Popularscienca serio de la Hungara Esperanto-Asocio; Budapeŝto: 1988. Abonprezo: 24 ned. guldenoj aŭ ekvivalento por kvar volumoj.

Ne estas malfacila afero, trafoliumante la paĝojn de tiuj ĉi du volumoj de periodaĵo jam firme establita, trovi multon por laŭdi. La akiro de ŝtata subvencio en grandeco tiel, ke eblas produkti tre bonkvalitan magazinon, eĉ kun la kovrilpaĝoj presitaj tre agrable en belaj koloroj, estas en si mem grava atingo. Ke oni rekompence devas dediĉi trionon de la enhavo al propagando por tiu ŝtato estas tolerebla prezo. Kaj en tuto, tiu ĉi periodaĵo simple ne havas rivalon en Esperantujo.

La sub-titolo de la magazino estas Popularscienca serio de Hungara Esperanto-Asocio, kaj la gamo de temoj estas ambicia kaj tute laŭ tiu priskribo. La regulaj sekcioj estas: Edukado, Naturo kaj naturprotektado, Medicino, Internacia datenarprilaborado, kaj Ekonomiko, sed estas evidente, ke la Redakcio pretas akcepti manuskripton kiu prezentus interesan temon ne strikte prialuditan en tiu listo.

Ni laŭdu la altan nivelon de la enhavo de la artikoloj. Se ne por ĉiu leganto ĉio havas apartan intereson, almenaŭ ĉiu leganto trovos ion vere legindan. Aparte, la sekcio pri Naturo kaj naturprotektado meritas laŭdon, ne nur pro la kvalito de la artikoloj sed ankaŭ pro tio, ke neniu alia gazeto en Esperantujo regule dediĉas spacon al tiu ĉi temo.

Ni laŭdu krome la ĝeneralan aspekton de la magazino laŭ teknika vidpunkto. La teksto, bonege kompostita, estas tre agrable kunmetita por plifaciligi legadon. Se mi mem trovas kazojn de neperfekta interpunkcio, la kaŭzo estas tio, ke mi estas pedantulo en tiu kampo. Ĝenerale, kompetenta Esperantisto frontus nenian malfacilaĵon dum legado, kvankam bone kompreni ĉion eble bezonus pli da peno kaj certe postulus disponeblecon de la Plena Ilustrita Vortaro. Kiel jam dirite, la enhavo de la artikoloj estas je alta nivelo.

Malgraŭ tiuj laŭdaj opiniesprimoj, ĉiuj sincere tenataj, por mi legado de la diversaj tekstoj kaŭzis ĝenon pro la lingvaj malglataĵoj. La ĝeno komenciĝis

jam je la unua trafoliumado. Bele kolorita reklamanonco kaptis mian okulon; tie estas bildo de komputero, kaj kun aparta intereso mi legis la tekston de la anonco. Ve! en tiu teksto oni aludas al 'komputilo' en kelkaj lokoj, kaj al 'maŝino' en aliaj lokoj.

Sen ia dubo, tiuj uzadoj de erariga formo de termino venas el konscia ideo, sed oni verŝajne ne konstatas, tia klara eraro evidentigas mankon kompreno de la bazaj nocioj komputado, komputero kaj datenarprilaborado. Konfesendas, ke por mi dum pluraj jaroj tiu aparta kazo de miskompreno ofte kaŭzas ĝenon; FOKUSO estas nur unu el pluraj redakcioj kiuj evidente agas ne-konservence.

Sed en FOKUSO troviĝas pluraj aliaj lingvo-malglataĵoj. Preskaŭ senescepte, tiuj dubindaj kazoj troviĝas en la tradukitaj tekstoj, pro tro supra pristudo de la originalaj tekstoj. Ĉar la enesto de tiuj tradukaĵoj kontribuas grave al la alta nivelo de la tekstoj en tuto, ni povas konkludi, ke la neta rezulto estas gajno. Mi rekomendas tiun ĉi serion de volumoj, fidante, ke la eldonisto sukcesos enstabiligi pli zorgeman provleganton.

Lorens' Mi.

De nia Ĝenerala Sekretario ni ricevis peton aperigi informeron ricevitan de la eldonisto de la serio, kiel sekvas.

Reklamanonco de entrepreno en la paĝoj de FOKUSO kostas ducent kvindek usonaj dolaroj. Varbanto de la reklamanonco rajtas aŭ ricevi aŭ disponigi, ekzemple al la kazo de IKEF, sumon en la egalvaloro de tridek elcento de la pagita sumo.

La eldonisto, kun la suhteno de S-ro Braun, volas instigi niajn membrojn nun varbi reklamanoncojn ne nur por MONATO, sed ankaŭ por FOKUSO. Plej taŭga por tiu lasta ŝajne estus granda entrepreno kiu eksportas el okcidentaj landoj al orienteŭropaj landoj.

(Via Redaktoro ne povas rezisti la tenton pripensigi legantojn pri la ŝajna nekonservenco de kalkulado de kosto de reklamado en usonaj dolaroj, en lando en kiu la valuto estas la forinto.)

### Nova eŭropa projekto: Plurlingva produkto-kodaro.

Kiel konate, komerco rapide evoluas. Ekde 1993a jaro, la komerco en la Eŭropa Komunumo estos tute libera je malhelpoj kaj sendube eĉ pli rapide evoluos, sed restos la konata lingvo-problemo.

la nomo, *Harmoniigita Sistemo*, (*Harmonised System, HS*), Sed jam konstatiĝas, ke la HS-kodoj tamen ofte ne sufiĉas por precize priskribi iun varon aŭ servon.

Komerco-Ĉambroj en pluraj landoj, laŭ interkonsento, fondis kompanion kun la nomo, *Chambernet Europe*, kiu faros, surbaze de la HS, pli detalan plurlingvan kodaron kun, laŭ prognozo, 40 000 terminoj maksimume. Al tiu kodaro oni donis la nomon, *Multilingual Product Description, MPD*. La elipunkto por la nova kodaro estas ekzistantaj produktolistoj en kaj Nederlando kaj Aŭstrio; tiujn listojn oni jam kunigis. Por tiu du-lingva listo, (nederlanda-germana), la Komerco-Ĉambroj en Okc. Germanio nun liveras aldone. La finrezulto oni tradukos en, unuakaze, la anglan, francan, italan kaj portugalan lingvojn, kaj poste en la svedan kaj danan lingvojn.

En elektronika formo, MPD plifaciligos senpaperajn interŝanĝojn de komercaj informoj, ekzemple pri dogano, mendoj, korespondaĵoj kaj tiel plu. En papera formo, MPD estos kvazaŭ terminaro.

Oni povas ricevi pliajn detalojn kontraŭ peto al:

Chambernet Europe,  
p.a. Holland Trade System,  
Postbus 326,  
3440 Woerden, Nederlando.

Resumis por ni la raporton en revuo,  
Export Magazine, je 1988-06-18,

Roland Rotsaert.

### Negocado en Ĉinio.

Kunmetas raporton por ni nia Membro,  
Kees Ruiĝ.

Negocadi en Ĉinio nepras envolviĝon en la burokrata aparato de tiu lando.

La ĉinaj negocantaj teamoj estas ĉiam grandaj laŭ nombro de partoprenantoj,

estas longega procedo kiu postulas enorman paciencon por ne-ĉinoj.

Por alilanda negocado en Ĉinio gravas ekscii la statuson kaj rangojn de la negocpartneroj; gravas ankaŭ funde koni la prioritaton kaj disponeblan financon fonon pri la produkto, kaj ankaŭ koncernajn regulojn de la propra registaro.

Sciado de la angla lingvo estas neofta afero en Ĉinio, kaj sekve negocado okazas plejparte en la ĉina lingvo. Konsilindas dungi propran interpretiston, kaj tiun antaŭe plene informi pri apartaj teknikaj terminoj, por kiel eble plej eviti stamblojn dum la negocsesioj.

Konsilindas ankaŭ eviti iun uzadon de proverboj, vortludoj kaj simile, pro tio, ke ili estas ligitaj kun kulturo, ligo kiu povus kaŭzi miskomprenojn. Por provi faciligi la taskon de via interpretisto, konsilindas ĉiam uzi simplajn esprimojn kaj mallongajn frazojn. Por ni Esperantistoj, vere meritas la penon klopodi akiri la servojn de Esperantisto-interpretisto, ĉar pruvita jam estas la fakto, ke la simpleco kaj la strukturo de nia lingvo grave kontribuas al la evito de miskomprenoj en negocado.

La ĉinaj negocantoj ŝatas ekkoni ion funde la detalojn kaj de la produkto, kaj de la entrepreno-proponanto, antaŭ ol esti pretaj fari mendojn; konsilindas tion ĉiam pripensi, kaj senhezite klarigi tion pri la produkto.

Alia foja kaŭzo de konfuzo estas malsimilaj metodoj pripensi ciferojn en diversaj lingvoj; evitado de ia tia konfuzo estas, tamen, vere simpla afero: nepre transdonu ciferojn en skribita formo.

Eble la plej valora konsilo por negocantoj en Ĉinio estas prepari kaj prezenti prospekton pri la varo tradukitan jam en la ĉina lingvo, kaj nepre en la lingvo uzata en Ĉinio mem. La lingvoj uzataj en Hongkongo kaj Tajvano ne taŭgas!

(iom koncizigita, flanke de l.m.)

## Al diskuto malfermita ...

## ni ricevis du kontribuojn.

De la malfermito de la diskuto  
venis klara repliko.

De la Prezidanto de IKEF  
venis pensigaj komentoj.

## i. Pri la neologismo, 'fri'.

Kvankam mi ne estas spertulo pri pertipa transporto, mi supozas, ke la esprimo 'fri ĝis', (aŭ eble nur 'fri'), korespondas al la anglalingva formo, *free*, kiu mem estas simpligo de *carriage paid* to ... (Subteno por tio troviĝas en la IKEF de Munniksma.) Ĉar komercistoj kutime ne estas gramatikistoj, ni ne atendu de ili senriproĉan lingvo-uzadon.

Mi demandas min, ekzemple, pri ĉu ofta angla esprimo kiel ... *free North-African port* ... (frajtkostoj pagitaj ĝis nordafrika haveno), gramatike eblas, en tiu lingvo? Ankaŭ en la angla, oni skribas, *transshipment*, (icocoo vortaro 797), kvankam laŭ la originaj vortoj ĝi devus esti *transshipment*, kun duobla 's'.

Tial por mi ne tre gravas, ke ankaŭ ni foje malatentu gramatikon.

## ii. Pri alfabeto ordigado.

Ne nur Esperanto estas problemiga en tiu ĉi rilato. La hispana lingvo havas 'ch', 'll' kaj 'h'; la germana lingvo havas 'ä' kaj 'ae'. ...

Terminarkompila programo por komputoro devas disponi pri ordigaj eroj por ĉiuj lingvoj uzataj en la terminaro!

## iii. Pri TEC kaj la Akademio.

Mi legas en TEC-cirkularo 3-1987, (nur antaŭneloge ricevita), la jenan aproban procedon:

1a aproba ŝtupo: en la Normiga Sekcio;  
2a aproba ŝtupo: en la TEC-komitato;  
3a aproba ŝtupo: en la Landaj kaj Fakaj Esperanto-Asocioj, kaj  
lasta aproba ŝtupo: en la Akademio de Esperanto.

Ke TEC "adoptis sintenon kontraŭ subteno de la Akademio", kiel asertas nia Redaktoro, ŝajnas al mi iom tro akra esprimo.

## iv. Pri iu baza laborplano de LM.

Mi legis kaj relegis LN-n 21, sed ne trovis bazan laborplanon proponitan de LM. Ĉu eble temas pri la teksto de Akano Eichholz, adaptita de LM? (ndlr: temas pri paĝo 10 de LN21.)

Pliaŭ al mi legi komentojn de aliaj Membroj niaj.

Roland Rotsaert.

Kun granda intereso mi legis vian kontribuon pri Terminika laboro, sur paĝoj 8 kaj 9 de LN22. Mi mem konsentas pri tiu termino, kaj pretas ekde nun ĝin uzi anstataŭ 'terminologia laboro'.

Ankaŭ pri viaj ideoj, mi preskaŭ tute konsentas kun vi, eĉ pri la kritikaj vortoj pri Akano Eichholz, pro la adopto de majusklo por derivaĵoj el propraj nomoj, kaj pro lia nova formo de landonomoj.

Kun vi mi opinias, ke por terminika laboro ni estonte devas kunlabori kun S-ro Eichholz en lia komputora sistemo kreota, ĉu nun en PeKoTeKo, aŭ ĉu poste en la Glosaro-Termekso. Nuntempe, ni devas uzi la plej modernajn rimedojn; sen ia dubo, tio indikas al ni uzadon de la elektronika komputoro. Per tiu ĉi letero, mi volas instigi vin realigi vian ideon, mem havigi al vi la saman komputorsistemon kaj programaron, kiel postulas S-ro Eichholz.

Vi esprimas la dubon, ĉu iam ni disponos pri sufiĉe granda financa bazo. Pri tio, mi mem ne tiom dubas. Se iutage estiĝos konkreta plano, pri kiu ni ĉiuj interkonsentas, tiam ni supozeble ankaŭ kapablos havigi al ni la bezonatan monon.

Kompreneble, ĝis kiam ni estos atingintaj tiun staton, ni plulaboros permane, tio estas, finpreparante la terminarojn, *Key words* kaj *Economie, Finance, Monnaie*, kaj eble aliaj. Tiel restas nia laborplano por la momento.

Franz J. Braun.

Via Redaktoro certe bonvenigos kaj provos aperigi iujn ajn novajn komentojn pri tiu ĉi temo, aŭ pri aliaj, por ni trafaj, temoj.

## MEMORIGILIO

Varbante novajn membrojn, aŭ pagante vian propran kotizon, bonvolu memori, ke la financa sidejo de la Fakgrupo estas en Brugge, en Belgio, kaj ne ĉe la Redaktoro en Britio.

Vizito al ekspozicio, sed kun  
iom surprizaj rezultoj.

por Roland Rotsaert.

Ligita kun la artikolo pri Termekso, en LN21, mi akceptis komision esplori por Akano Eichholz la ŝajnaj vendeblecoj en Eŭropo por vortarego elektronika laŭ la priskriboj en la artikolo.

Malgraŭ miaj timoj, (pro absoluta manko de spertoj en merkatesplorado), mi komencis kolekti diversajn informojn, kaj lastatempe mi vizitis la ekspozicion, (paŝo 88, (Oficejo 88), en Bruselo. Tie ricevis kelkajn ne-atenditajn informojn, kaj nun iom skize raportas pri ili.

Konfesendas, ke mi ne plane dividis kun S-ro Eichholz la fidon, ke nia Movado devas la organizajn kapablojn produkti kaj vendi grandegan, plurlingvan vortaron sur la tiel-nomata kompakta disko. Tuj je eniro en la ekspozicion mi konstatis, ke tiu kapablo ne plu necesas: jam ekzistas precize tia vortaro sur precize tia portabla. Publikigita de la konata nederlanda sidonejo, *Holters Noordhof*, ĝi enhavas jam la lingvojn nederlanda, franca, angla, itala, ĉina kaj japana, kaj vendas je prezo ekvivalenta al 37 mil belgaj frankoj. La prezon oni fiksis por esti proksimume egala al la sumo de la kostoj de la vortaroj, kiujn ĝi enhavas.

Por utiligi, (tio estas, konsulti), la diskon oni bezonas, krom komputoron de iu kongrua tipo, specialan disko-legilon. De tia aparato, pluraj markoj estas proponataj, je prezoj inter 50 kaj 70 mil belgaj frankoj. Mi mem ne povis provi utiligon de tiu aparato, ĉar kompetenta komizo ne estis vokebla en tiu momento; laŭ la ligoj, tamen, eblas fari ĉiujn ligojn inter ĉiuj el la diversaj lingvoj.

Por aliaj taskoj, utiligante komputorojn, jam estas proponataj similaj memor-diskoj, je prezoj ekde 10 mil frankoj.

La normojn por stori kaj legi la informojn sur la diskoj elpensis la konata programverkadentrepreno, *Microsoft*. Tiu entrepreno donis al la normaro la nomon, *High Sierra*, kaj ŝajne ĝi estas jam akceptita de la industrio. Oni diras, ke en ĝi restas ankoraŭ difektetojn.

Kunlabore kun la eldonejo, *Kluwer*, en Nederlando, *Microsoft* ĵus eldonis libron kun ĉiuj informoj pri tiu tipo de memoro sur kompakta disko. Emfazendas, ke tiu memoro estas legebla per ordinara komputoro, kvankam farebla nur per tute speciala

aparataro. Tion klarigis ankaŭ S-ro Eichholz en la prialudita artikolo.

Mia konkludo estas, ke ne plu utilis esplori la merkaton; mia konsilo estas, ke ni provu kunlabori kun *Microsoft*.

Tute alian, sed ankaŭ vere interesan, servon prezentis la (ŝajne britdevena) entrepreno, *Low Cost Linking*, de Valkensward, Nederlando. Temas pri reto de elektronikaj leterkestoj, aranĝita tiel, ke ĝi povus anstataŭi multekostajn teleks-kaj teleteks-aparatojn.

Sub la aranĝo, la kostoj por transsendo de informoj inter leterkestoj estas mirinde malaltaj. Post pago de la baza kosto por la 'leterkesto' de ses mil frankoj, la luprenkostoj estas mil frankoj monate. Uzante personan komputoron kaj telefonaparaton, oni povas sendi tekstan mesaĝon al ies leterkesto je prezo de loka telefonvoko. La ricevanto faras similan pagon por 'malplenigi' la leterkeston, eĉ se loĝanta en fora lando.

Sendi mesaĝon al ekster la reto de *Low Cost Linking* ankaŭ eblas, sed en tia kazo la kosto egalas al tio por ordinara transsendo per telekso aŭ teletekso.

Tiu ĉi sistemo povus esti interesa formo de komunikilo por la E.-Movado, inter E.-oficejoj, eldonejoj, libroservoj kaj eĉ privatuloj kiuj multe korespondadas. Ĉar ekzistas konkurencaj sistemoj, povus esti grava decido elekti iun sistemon prefere al alia; en ĉiuj, favoraj prezoj aplikas nur se oni restas tute ene en la reto, kaj do la plej taŭga aranĝo estus, ke ĉiuj E.-instancoj aliĝu al la sama reto.

Pluraj firmaoj akceptis mian peton ricevi skribitajn detalajn informojn per poŝte. La nuna raporto estas verkita el neceso sen ĉiuj detaloj, sed ŝajnas al mi, ke la informoj estas tiel gravaj por ni, ke la manko de plenaj detaloj estas bagatela afero. Pli detalan raporton mi preparos por la LN-o kiam eblas. Al personoj aŭ instancoj, kiuj nepre volas havi pli da informoj kiel eble plej baldaŭ, mi pretas fari apartan raporton, kaj sciigi adresojn, ktp.

La AKADEMIO de ESPERANTO.

-- Sendependa lingvo-instituto fondita de  
D-ro L.L. Zamenhof en 1905. --

OFICIALAJ INFORMOJ.

*Cirkulero 155, aldono C.*

REGULARO pri Aprobo de Fakaj Termin(ar)oj.

I Temoj. Oni povas (rajtas) fari peton al la Akademio pri kontrolo de:

- a) unuopa termino aŭ limigita kvanto da terminoj ne establitaĵoj aŭ pri kiuj estas neunueco en la uzado;
- b) pli aŭ malpli kompleta terminaro de difinita fako;
- c) lernolibro pri difinita fako aŭ temo, enhavanta fakajn terminojn.

II Petantoj.

a) Unuopan terminon aŭ limigitan kvanton da terminoj povas prezenti por pristudo, kritiko kaj eventuala aprobo kiu ajn Esperantisto kompetenta pri la fako, al kiu la termino(j) apartenas.

b) Pli vastan terminaron povas prezenti Esperantista faka asocio de la koncerna fako, sed ankaŭ grupo da kompetentuloj aŭ unuopa kompetentulo, kiu ellaboris la verkon, prefere pere de la koncerna faka asocio Esperantista, se tia ekzistas.

c) Fakan lernolibron povas prezenti aŭ Esperantista faka asocio, kiu iniciatis la ellaboradon de la verko, aŭ la verkinto(j) aŭ tradukinto(j) de la verko, aŭ la eldonisto. La studotan materialon oni sendu en 3 ekzempleroj al la Direktoro de la ĉi-sube menciita Komisiono de la Akademio.

III Pritrakto.

La Akademio starigas Komisionon pri kontrolado kaj aprobo de terminaraj verkoj. Ricevinte demandon pri termino(j), terminaro aŭ faka lernolibro, la Komisiono ekzamenas la proponitajn terminojn el lingva vidpunkto laŭ la Fundamento de Esperanto, kaj raportas al la Akademio. La voĉdono de la Akademio pri la raporto ampleksu eventualan decidon ĉu doni al la petinto la rajton noti sur la eldonaĵo: "Aprobata de la Akademio de Esperanto".

La Direktoro de la Komisiono pri Akademiaj Aproboj, Akademiano Profesoro Doktoro Carl Stöp-Bowitz.

*La Akademio petas la afablan represon de tiu ĉi decido.*

Cu oni rajtas redakti ... ?

Via Redaktoro aŭdacas iom redakti la ĉi-kunan Oficialan Decidon de la Akademio de Esperanto, antaŭ ol permesi, ke ĝi aperu en la prestiĝaj paĝoj de la Labokaza Novaĵletero.

Sen granda dubo, tiu via Redaktoro ricevos iun punon pro tiu ago. Sen ia dubo, pluraj legantoj ridos pro la aludo al 'prestiĝaj paĝoj'; la LN-o ankoraŭ restas modesta bulteno sen granda renomo, iranta al modesta nombro de membroj.

Restas demando, ĉu iu ajn Redaktoro havas la rajton kvazaŭ korekti, (PV 261), la lingvo-uzadon de Akademiano, ĉu aŭ ne la periodaĵo okupas gravan rolon en la Esperanto-Movado?

Via Redaktoro preferas prijuĝi la situacion de alia vidpunkto, de tiu de leganto de eĉ modesta periodaĵo; se iu tia leganto estus motivigita kutimiĝi al malbona aŭ eĉ erara lingvo-uzado, sekve de legado de Oficiala Informo de la Akademio de Esperanto, mi tion tre bedaŭrus.

Kaj tiu via Redaktoro jam faris decid-ojn ne represi pli fruajn I.O.-ojn, pro la sama motivo. (Mi aludas al tiu pri 'Prepoziciaĵo por la subjekta suplemento' kaj al la 'Oficiala Informo de la tri Akademioj AdE AISO kaj AC Komuna konkludo'.)

Pri la unua, kiu aperis en La Letero de l' Akademio de Esperanto kun dato Oktobro 1987, mia verdikto estis kaj estas, ke la interpunkcio uzata estas tiel malbona, ke almenaŭ mi mem ne povus fidi je mia kompreno de la decido. (Pri la nivelo de interpunkcio en la tuto de tiu La Letero mi jam interŝanĝis leterojn kun la Prezidanto de la Akademio.)

Ankaŭ en la dua, kiu aperis en la posta La Letero, la nivelo de interpunkcio estas ne tre bona, kvankam ne tiel malbona, ke kompreno de la enhavo estas tre malfacile atingebla. Mia plej grava kritiko pri tiu I.O-o estas pri la ĝenerala aspekto kaj pri la ne-konsekveneco de enmeto de frazo pri abundeco de materialo neklarigita sed evidente ne havante ian rilaton kun la Oficiala Decido mem.

Sed kion fari pri la I.O-o kiu klare havas intereson por ĉiu faka organizaĵo en la Esperanto-Movado? Ĉi aperas en La Letero de l' Akademio por Aprilo Majo Junio 1988. Jes! tiuj majuskloj ja troviĝas je la kovrilpaĝo de La Letero. Jen la unua malglataĵo. Ĉu la Akademio vere volas, ke ni instruu al lernantoj de nia lingvo kutiman uzadon de majuskloj por monato-nomoj, malgraŭ tradicia uzado

de minuskloj?

Dua kaj tria malglataĵoj estas la manko de aŭ dato aŭ sideja adreso por doni aŭtoritaton al la Oficiala Informo, kvankam mi jes agnoskas, ke postuli tiujn estas trajto de pedantulo.

Mi tuj diru, ke la nivelo de interpunkcio estas konsiderinde pli bona ol en la antaŭaj I.O.-oj, kvankam lertokula leganto, kiu havas la eblecon kompari la redaktitan formon kun la originalo, povas trovi kelkajn 'korektigojn'. Aparte menciinda, mi opinias, estas la klara manko de la vorteto 'aŭ' en ero (c) en Sekcio II.

Vere kaŭzas ĝenon al tiu ĉi Redaktoro rimarki la uzadon de minusklo por la vortoj, Esperantisto kaj Esperantista. Denove mi starigas la demandon: Ĉu la Akademio provas devigi nin tiel instrui lernantojn?

Kaŭzas ĝenon ankaŭ la uzado de malbona formo por la dudek-sesa litero de nia alfabeto. Se la Akademio pretas pretigi eĉ Oficialan Informon sen provo sekvi mem la Fundamenton de nia lingvo, ni ne plu miru, ke en kelkaj kvartaloj tiu Akademio ĝuas ne-bonan reputacion.

Sed mi rezervas mian plej akran kritikon por la uzado de 'povas' kiam klare la senco postulas la uzadon de 'rajtas'.

La eraro okazas nur kvar-foje, sed en neniu loko el tiuj aperas iu aparta kialo por uzado de alia formo ol tiu tute normala en tiaj kazoj, 'rajtas'.

Ambaŭ vortoj venas al ni el la Fundamento de Esperanto. Tute klare, kaj jam dum jardekoj, la difino de 'povi', (PV p. 378), estas - havi la forton, lertecon aŭ kapablon necesan por fari ion. Dua proponita difino estas - havi la rajton, la aŭtoritaton por fari ion. Kun tiu difino venas klara propono iri al la alia vorto, 'rajti'. Tria difino ŝajne ebligas la uzadon kun la senco havi la permeson, sed la uzekzemploj estas ĉiuj apartaj.

La difino por 'rajto', (PV p. 398), - povo, pravigita de leĝo aŭ moro, nepre fari ion aŭ postuli ion de aliuloj - ja donas en rektaj vortoj precize la senco indikitan per tiu Oficiala Informo.

Kial krei konfuzon, kie konfuzo ne estas konata, mi scivolas? Ŝajnas al mi, ke ĝi estas ligita kun tiu alia demando, kiun mi faris lastatempe al la Prezidanto de la Akademio: kie troviĝas la Oficialaj difinoj por la Oficialaj vortoj en nia lingvo?

Lorens' Mi.

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ por ĉiuj tri milimetroj de longeco, enkadrigita, sed kun minimumo de ok irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita. Ĉiam: tri aperoj de la sama anonco en sinsekvaj kajeroj por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 24 b.fr.

Varbi reklamanoncojn por nia organo estas tre trafa metodo subteni vian propran organizaĵon!

Por viaj propraj aferoj, uzu la senkoston servon de via propra komunikilo: La Laŭokaza Novaĵletero. Kaj ĉiam legu la rubrikon, Reklamanoncoj.

#### La Stelo.

La valida kurzo en Britio por la Stelo estas: 1.00 pundo egalas al 3.395 Steloj. Respondecas pri ĝi S-ro Lorens' Mi, 19 Cranbury Road, Eastleigh, Hants., SO5 5HB, Britio. Petu detalojn, aldonante irpk-on.

### *Teknike pri la Laŭokaza Novaĵletero.*

Respondeca redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee, ĉe la Redakcia adreso: 19 Cranbury Road, Eastleigh, Hants., SO5 5HB, Britio.

Eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, ĉe la provizora ĉefsidejo: Hornisgrindestrasse 8, 7580 Bthl 16, Okc. Germanio.

La Redaktoro kaj Eldonanto aperigas subskribitajn artikolojn sen aŭtomata akcepto de respondeco por opinioj tie esprimitaj.

La rajto de represado estas malferma al ĉiu ajn persono aŭ instanco, kiu tiun rajton volas preni, kondiĉe nur, ke la fonto estu klare indikita.

La limdato por ricevo de materialo por la proksima kajero estas sabato, la 10a de decembro, en Eastleigh, Britio.

La originala teksto-paĝoj de la LN-o estas preparitaj sur folioj de la formato dinA4, (210 mm oble 297 mm), kun posta redukto al grandeco de A5 antaŭ presado.

La maksimume disponebla spaco por artikoloj proponataj kiel 'prespretaj', do, estas 180 mm en larĝeco kaj 240 mm en longeco. Normala skribmaŝino tajpas 71 literspacojn en la larĝeco de 180 milimetroj; alia tipo de maŝino skribas 85 literspacojn en la sama larĝeco. Tiuj du ciferoj estas por ni la maksimumoj normale uzataj.

En longeco de 240 milimetroj, normala skribmaŝino povas meti 56 liniojn, inkluzive de iuj liberaj linioj; aliaj aparatoj, ekzemple komputoroj, povas meti en longeco de 240 mm, 61 liniojn. Ni pretas akcepti aŭ unu aŭ la alia.

Oni povas pensi pri 600 vortoj kiel la kapacito de unu paĝo, utiligante la malpli grandan litertipon.

La Redakcio bonvenigus artikolojn proponatajn por aperigo en la Laŭokaza Novaĵletero, kondiĉe ĝenerale, ke la temo akordiĝas kun la sinteno de la Fakgrupo, kaj aparte ke la teksto mem obeas la regulojn de la Fundamento de Esperanto kaj konformas al la normoj de interpunkcio, kaj tiel plu, normalaj en la LN-oj.